50a Jaro — N-ro 3 — Majo - Junio 1958a

BELGA ESPERANTISTO



Oficiala dumonata Organo de

REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliĝinta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktoro-Administranto :
la Prezidanto de R.B.L.E. :
Maur. JAUMOTTE
Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Fondita en 1908a
★
Abonprezo : Fr. 100,-

REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Prezidanto : S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.
Vicprezidanto-Kasisto : S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
Vicprezidantino : S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
Ĝenerala Sekretario : S-ro H. Sielens, "Internacia Marista Domo"
Falconrui, 21, Antverpeno.
(Poŝtĉeknumero : R. B. L. E. : 13.37.67)

esperantistoj ĝuas rabaton.

K. Deloof

diplomita optikisto

granda elektebleco inter muntaĵoj kaj okulvitroj de la plej bonaj markoj

Academiestraat, 8 Brugge
Tel. 360.74

Akceptita de la formalsanulaj kasoj

La Ekspozicio kaj Ni

Antaŭ unu monato, la 17an de aprilo, la Reĝo Baŭduino kaj la reĝa familio ĉeestis la malfermiĝon de la Universala Ekspozicio de Bruselo 1958 kaj multaj liganoj havis jam la okazon, kune aŭ aparte, viziti la belegan kaj grandiozan elmontradon de 53 landoj, kiuj tiucele sendis al nia lando la plej trafan kaj la plej sensacian el ĉio, kion ili produktas.

Kaj ni estas fieraj, ĉar nia lando havis la kuraĝon iniciati kaj organizi tian eventon !

Ni estas duoble fieraj, kiam ni pripensas ke tiun kuraĝon ni, — en la daŭro de malpli ol sepdekkvin jaroj —, havis 11 fojojn : dum ĉiuj landoj en la mondo kune havis ĝin nur 31-foje.

Pli ol triono de la Universalaj Kongresoj, kiuj estas organizataj laŭ severaj normoj, okazis do en nia eta lando.

Nur tri aliaj en Eŭropo, Germanujo, Aŭstrujo kaj Italujo unufoje strečis siajn fortojn, dum Norda kaj Suda Ameriko entute havis ses ekspoziciojn.

Anglujo, kiu organizis la unuan mondekspozicion en Londono en 1851, tion refaris kvarfoje nur, kaj unu fojon nur en Londono.

Francujo invitis la mondon sesfoje . . . sed sesfoje en la sama, nura lumurbo Parizo . . . Dum ni kuraĝis riski tion en kvar diversaj urboj :

La unua en la vico estis Antverpeno en 1885, kiu repetis la rajton jam por 1894 ; dum kiu jaro ĝi iniciatis la kreon, — flanke de la Ekspozicio mem —, de tiuj gajaj kvartaloj, kiuj nomiĝis, unuafoje, " Oud Antwerpen " ; poste " Vieux Paris ", " Ancienne Belgique " kaj " Vrolijk België ".

Antverpeno krome, en 1930, — okaze de nia Nacia Jubileo —, kunorganizis kun Lieĝo duoblan tian Ekspozicion. Lieĝo ankaŭ jam antaŭe faris en 1905, dum Gento faris poste en 1913. La ĉefurbo havis la honoron laŭvice en la jaroj 1888, 1897, 1910, 1935 kaj nun.

* * *

Kelkaj inter niaj legantoj eble demandas al si . . . kaj al ni . . . ĉu ni, kiel Esperantistoj, rajtas same fieri.

Kaj al tiu demando, ni volas malkaŝe respondi :

Kiam ni pensas pri Universala Ekspozicio, ni nepre ne pensu pri iu, — kia ajn granda, — Komerca Forio, en kiu oni luprenas standon.

En Universala Ekspozicio temas pri pavilonoj, grandaj domegoj, veraj palacoj, kiuj estas konstruataj, memelspeze, de la Ŝtatoj.

Krome estas kelkaj, malmultaj, sed ankaŭ gravegaj pavilonoj rezervataj, — almenaŭ nunjare —, al grandaj Internaciaj Organizaĵoj.

Ĉiu komprenos ke, en la ŝtataj palacoj, ni havas fakte neniun ŝancon ke, — en tiu grandega elmontro de forto, en tiu ampleksa, komparcela prezento de la plej gravaj naciaj eltrovaĵoj —, iu lando konsentu dediĉi parton de sia limigata spaco al Esperanto aŭ al simila movado.

Restas la kelkaj privataj pavilonoj. Tie, klopodoj estas faritaj de D-ro Kempeneers, prezidanto de Belga Centra Komitato Interliga,

kaj ĉie la respondo estis, ke ili nepre devas konservi sian iom mallarĝan kadron kaj neniel povas pensi pri havigo de loko al movado kiel la nia, ĉar cedo, farita pro simpatio, al unu, ja devigus al multaj pliaj cedoj.

Jen do rilate al la eventuale efektiva partopreno en la Ekspozicio.

* * *

Alflanke, ni povas atesti ke la Organiza Komitato de la Ekspozicio estas, principe, vere favora al ni. Kaj, antaŭ multaj monatoj jam, esperantlingve skribita letero de la Organiza Komitato antaŭvidigis la eblecon, ke prospekto estus eldonata en nia lingvo, se montriĝus sufiĉe da intereso.

Sed, se ni povas kalkuli la leterojn senditajn en nia lingvo al tiu O.K. sur la fingroj de unu aŭ almenaŭ de du manoj, oni ja vere ne rajtas plendi, se la Komitato fine rezignis tiun ĉi iniciaton.

Pri tio ne ni, — surlokaj esperantistoj, — respondecas, sed kulpas la indiferenteco de la internacia esperantistaro, al kiu ni ja apartenas . . . Indiferenteco, kiu ankaŭ estas nia, kiam alilandaj Ligoj petas nian helpon por veki atenton aŭ intereson de administracioj en propra lando. Ni tiam ankaŭ facilanime forgesas sendi nian petleteron !

Malgraŭ tio, la Komitato decidis aldoni nian lingvon en la vicon de la lingvoj uzotaj en la Ekspozicio de la interpretistoj kaj gvidantoj.

Al kvardek inter ni, ĝi transdonis specialan ateston de " Bonvolema Interpretisto por la Esperanta Lingvo " kun la badĝo, kiun ili portos. La individua letero, tiucele sendita al ĉiu, estas ankaŭ redaktita en nia lingvo.

La sekvo de tio estas ke, — kiam la Asocio de Belgaj kaj Eksterlandaj Periodaj jurnalistoj organizis sian konkurson kun premio de 10.000 frankoj por artikolo aperinta pri la Ekspozicio —, tiu ĉi, **laŭ ekzemplo de la Ekspozicio kaj propramove**, akceptis Esperanton.

Plie ni estas en konstantaj rilatoj kun la Organiza Komitato kaj ĝi direktos sin al ni por ĉiu vizitanto, kiu skribos al ĝi esperantlingve por anonci sian viziton kaj kiu petos helpon aŭ gvidadon.

Se ni aldonas al tio ke, dank'al tiu decido de la Ekspozicia Komitato rilate al nia lingvo kaj dank'al la propagando, kiun ni, per tiu decido, povis fari en la tagĵurnaloj, ni tamen akiris certan sukceson.

Ĉar se, — ekzemple kaj por citi nur unu urbon —, estis respektive 55 kaj 56 lernantoj en la lastaj du kursoj de la Antverpena Grupo, tre certe grandparte estas, ĉar ni povis substreki ke restis ankoraŭ sufiĉe da tempo, ne plu por lerni anglan aŭ germanan lingvon antaŭ la malfermo de la Ekspozicio, sed ja por lerni Esperanton !

Ni do ne plendu ! Ni ĝoju ! Kaj ni prenu la decidon, estonte, ĉiam regule atenti la alvokojn faritajn de esperantaj instancoj por helpi konvinki publikajn administraciojn, ĉu ministeriojn, ĉu radion.

Se ĉiuj ni tion faros, la Ekspozicio estos farinta al ni gravegan servon, multe pli longedaŭran, multe pliefikan ol kiu ajn bela panelo ĉe unu el la miloj kaj miloj da muroj de la senfina pavilonserio.

* * *

Alia demando, kiun iuj tre certe jam faris al si, estas : Kial la belga movado ne invitis la Universalan Kongreson al nia lando, dum tiu ĉi jaro 1958.

Principa decido de la U.E.A.-estraro

Universala Kongreso en Bruselo en 1960

El la aprila numero de " Franca Esperantisto " ni represas la ĉi suban raporton pri la lasta kunsido de la estraro de U.E.A., okazinta en Rotterdam :

" Dum la tagoj, 11 kaj 12-a de Aprilo, la estraro de U.E.A. kunvenis en la sidejo en Rotterdam. Prezidis Prof. D-ro Giorgio Canuto, ĉeestis Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, H.W. Holmes, vic-prezidanto, René Llech-Walter, estrarano pri financoj. Protokolis F-ino Vermaas dank'al diktomaŝino " Stenorette ". Partoprenis la

---

Ankaŭ al tiu demando ni volas malkaŝe respondi : Ni ja nè devis inviti. Siatempe, — antaŭ la indiko de Mainz kompreneble —, la Ĝenerala Sekretario de U.E.A. mem petis nin kaj instigis nin havi la kuraĝon inviti la tutmondan esperantistaron, okaze de la Universala Ekspozicio.

Ni funde tiam esploris la demandon kaj ni rezignis !

Kaj nun ni povas esti feliĉegaj, ĉar ni havis la kuraĝon nè akcepti, sed rezigni kaj ĉar ni ne lasis nin konvinki.

Nunmomente, jam 350 kongresoj kun pli ol 200.000 membroj, estas antaŭvidataj. Tiuj ĉi daŭros de du, tri ĝis ok tagoj.

Tio signifas ke, — en ĉiu tago, — almenaŭ estos sep ĝis dek kongresoj samtempe. Kaj, ĉar ni nepre volas kongresi dum aŭgusto, ni povas kalkuli ke, je tiu momento, estos samtempe, en la Ekspozicio, dekkvin ĝis dudek kongresoj.

Ni unue volas pensi pri la kongresanoj mem . . . Kaj ni povas esti kontentaj ke ni ne akceptis la riskon devigi personojn, kiuj ŝatas bonan liton en konvena hotelo, dormi sesope sub la plej komforta tendo.

Kaj tian riskon ni certe estus havintaj, dum aŭgusto proksima.

Ni preferas lasi sub la tendoj, tiujn, kiuj tion ŝatas ; en dormejoj, tiujn, kiuj tion preferas, kaj en hotelaj ĉambroj tiujn, kiuj tion deziras.

Kaj tion ni ja povos fari tre certe en la tuja estonto. Precipe nun, kiam Bruselo kaj Belgujo ĝenerale faris gravegan klopodon por plimultnombrigi kaj plikomfortigi siajn loĝigajn eblecojn.

Sed, rezignante tiam por 1958, ni restis kandidatoj por tiu tuja estonteco. Tiun ĉi jaron, oni iros do al Mainz, sed ni, de tie, kondukos al nia lando gravan karavanon de postkongresaj ekskursantoj, kiuj vizitos la Ekspozicion.

Kaj la proksima jaro estas rezervita al la polaj samideanoj pro la jubilea jaro. Sed krome ni staras inter la tutunuaj, ĉar jam plejlongtempaj kandidatoj, kiuj deziras organizi Universalan Kongreson, kiu tiam ne dronos en la indiferenteco, kiun ĝi certe nun renkontus en la amaso de la 350 nunjaraj kongresoj.

Sed tuj post la Ekspozicia periodo, ni ne nur pensos, sed jam prepariĝos al tiu granda evento, la tria okazonta en Belgujo.

Maur. Jaumotte.

diskutojn, laŭ la tagordo, S-ro W. Auld, redaktoro, G.C. Fighiera, K.K.S.

Post telefona komunikado kun L.K.K. en Varsovio la estraro ĝojas pri la elekto de la urbo kaj la bonega organizo antaŭvidita. **Por 1960 oni elektis Bruselon pro diversaj kaŭzoj klarigotaj en Mainz.**

Malgraŭ la propagandaj elpezoj, eldonadoj k.t.p. la rezultoj estas sufiĉe kontentigaj sed ĉiuj esperantistoj devas klopodi por plialtigi la nombron de la membraro. La jaro 1957 finiĝis per membronombro de 27.093, nun la celo al 30.000 !

La kunvenoj daŭris 22 horojn dum kiuj estis pritraktataj ĉiuj problemoj de nia movado. "

* * *

Al tiu ĉi teksto, ni povas aldoni ke la prezidanto de R.B.L.E., S-ro M. Jaumotte, ĉeestis parton de la kunsido de la estraro de U.E.A., en Rotterdam.

La konkludo de la interŝanĝo de ideoj, rilate al la proksimaj kongresoj, estis efektive la supre citita novaĵo pri la principa elekto de Bruselo, kiel urbo en kiu okazos, en 1960, la 45a U.K.

Estas ankoraŭ tro frue por komuniki la kunmeton de la definitiva L.K.K., sed ni povas diri ke, je la iniciato de S-ro Jaumotte, kiu al la estraro de U.E.A. firme promesis mem direkti la preparajn laborojn, jam tuj ekformiĝis " skeleta " L.K.K., kiu, ekde nun, jam kunmetos la ĝeneralan planon de la Kongreso.

Tiu ĉi konsistas el la Prezidanto, S-ro Maur. Jaumotte ; la vicprezidantoj : S-roj G. Maertens kaj H. Sielens, resp. ĝeneralaj sekretarioj de Flandra kaj Reĝa Belga Ligoj Esperantistaj ; la gememboj : S-ro R. Jacobs kaj F-ino R. Huysmans, resp. prezidanto kaj sekretariino de Reĝa Esperantista Brusela Grupo, kaj S-ino H. Plyson, kiu jam de pluraj jaroj prizorgas ĉiujn financajn aranĝojn kun la diversaj L.K.K., loĝas en Bruselo kaj estas unu el la plej regulaj belgaj ĉeestintoj de la postmilitaj universalaj Kongresoj.

SE VI PAROLAS PRI STROVI... VI PENSAS PRI VIANDAĴEJO. SE VI PENSAS PRI VIANDAĴEJO... VI AĈETAS ĈE STROVI

Aug. Stroobandt-Victoor

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj :
GARANTIO pri
bona kvalito
kaj bona prizorgado

Telefono : pogranda komerco 34559
detala » 33408

STROVI estas unuaranga !

la diversaj direktoj en la moderna arto

Antaŭ ol priparoli la ĉefajn direktojn en la pentroarto, ni devas unue ekzameni la diversajn manierojn laŭ kiuj la artisto povas esprimi siajn sentojn kaj pensojn.

1) La pentristo povas kopii *kion li vidas* kun la intenco reprodukti la naturon tiel precize kiel eble. Li estas *Realisto*. La realisto donas nenion de si mem. Li estas nur objektiva, fakta. La naturo de kiu li faras bildon estas *la celo*.

2) La artisto penas por reprodukti *kion li sentas*. Interne li asimilas kion li observis aŭ travivis, kaj klopodas esprimi tion. Li estas *ekspresionisto*. La ekspresionisto do ne donas reproduktaĵon de la realo, sed esprimas *la ideon* kiu vivas interne en li. Por doni formon al tiu ideo li povas uzi la naturon, sed ĝi restas *helpilo*, neniam iĝas celo. Li ankaŭ povas aliformigi aŭ troigi tiun naturbildon, se li opinias ke per tio lia emocio estas pli bone esprimata.

3) Fine estas ankoraŭ la pentristo kiu ne okupas sin pri la naturo, kiu ne bezonas emocion kaj ne volas esprimi emocion. Mallonge dirite : tiu kiu nur volas pentri, revi per koloroj kaj linioj. Kompreneble, ĉiu estas libera por opinii tiujn revojn stultaj. Sed la pentristo ankaŭ estas libera por ne malkvietigi sin pro iu ajn kritiko, kaj plue revi kviete. Kiu ne ŝatas lian verkon, ne estas devigata rigardi al ĝi. Sed ne ridu pri ĝi ! Ja, ĉiu revas laŭ sia propra maniero. La ĵusprezentita pentristo kreas sian propran mondon. Li ludas per linioj, koloroj, formoj, kiel la komponisto ludas per sonoj kaj ritmo. Ne plu estas ia kontakto kun la realo kiel ni perceptas ĝin. Lia arto estas *abstrakta*.

Tiuj-ĉi estas la tri ĉefaj eblecoj por krei artverkon. Kaj nur tiam estas eble ĝui ĝin, kiam oni rigardas per komprenemaj okuloj. La rigardanto kiu lernis vidi, alĝustigas sian rigardon laŭ la direkto kaj la temo. Li rigardas alimaniere al abstrakta pentraĵo ol al ekspresionista. La karaktero de la admiranto aŭ vidanto poste balancigos la pesilon al unu aŭ alia flanko.

Ni nepre ne povas komenci la studon pri la modernaj direktoj, ne sciante kontraŭ kio ili ribelis. Ĉiu direkto estas aŭ *sekvo* de la antaŭa, aŭ *ribelo* kontraŭ la antaŭa. Kaj por pli bone kompreni kion la nova skolo intencas, oni certe devas scii en kio la antaŭa malpravis.

Ni komencas ĉe la Renaissance. La mezepoka homo direktis la rigardon al la postmorta vivo, al la ĉielo, al la eterneco. Pro tiu kaŭzo lia arto disradias intimeman piecon. La Renaissance-homo kontraŭe, akceptas la vivon kiel donacon de Dio, kaj li volas fari de tiu-ĉi vivo kio estas farebla el ĝi. Li estas la ĝuanto. Liaj okuloj malfermiĝas por ĉio monda. Li ekdubas pri la kredaj dogmoj. (Reformacio !) La religio perdas sian ĉiopovon. Per studo la Renesanca homo penadas traesplori ĉion kio ĉirkaŭas lin. Tiukaŭze ĝi estas la tempo de la grandaj eltrovaĵoj. La artisto serĉas inspiracion precipe ĉe la Klasika Antikva Tempo. En tiu periodo, la eminentaj Grekoj kaj Romanoj havis saman aspiron.

Sed iom post iom la artisto troigas. La teknika lerteco arogantigas lin. Tiamaniere la Renesanco transiras al tempo de superfluo kaj senbrido : la Baroko kaj Rokoko. Tio kondukas al ekstravagancaĵoj : verkoj kiuj dronas en la ornamaĵoj de linioj, girlandoj, konkoj, floroj. Je la fino de la 18a jar-

cento, la bombo eksplodas : oni naùzas pro tiu malserioza, facilanima konduto. Oni volas reveni al la serena plano, sen ornamaĵoj, kiel faris la Grekoj en la Klasika Tempo.

La *Klasikismo* naskiĝis kiel reakcio kontraù la senbrideco. de la Baroko kaj de la Rokoko. Koloro estas nur akcesoraĵo, laù la klasikuloj. « La arto » tiel ili diras « estas io kion oni povas lerni ». Do : pli scienco ol arto. Tio estas la kaùzo ke la Klasikismo estas tiel seka, rigida, tiel « akademia » en la malbona senco de la vorto. Estas speco de severeco kiu forigas ĉian spontaneecon. (Ekzemplaj klasikuloj : David kaj lia disĉiplo Ingres). Do ne mirinde ke baldaù anoncis sin nova reakcio. Tiu-ĉi ne volis sciencan ekzaktecon. La artisto devas aldoni al sia verko ion de si mem. Tio estas la *Romantismo*. La romantika pentristo esprimas sin en supermezuraj pentraĵoj. Grandegaj historiaj scenoj estas en la modo, kun batalegoj de 4 kaj pli da kubikmetroj. Sed iom post iom ankaù la romantikistoj troigas. Ilia senlima sentimentaleco ellogas novan reakcion. Sufiĉe da historia patoso ! Sufiĉe da ploroj kaj larmoj ! Ĉirkaù 1860 la rompo estas definitiva : la *Realismo* forpuŝas la romantismon. En Francujo la nova skolo prosperas kun Rousseau, Courbet, Millet. Ankaù kun la grupo de Barbizon. En Belgujo elstaras Henri De Braekeleer. La realismo kiu volas esti tiel naturfidela serĉas fine la malbelon en la naturo : *la arto ekhavas socialan moralcelon. La artisto volas denunci*. Li atentigas la homon pri tio kio ĉirkaùas lin kaj precipe pri la « brutala realo ». En tiu-ĉi tempo Zola priskribis la vivon de proletoj; la granda Franca skulptisto Rodin kreis sian « Burĝoj de Calais »; la sprita Daumier ridindigis la burĝaron kaj Constantin Meunier skulptis siajn neforgeseblajn laboristtipojn. Havenolaboristoj, minlaboristoj, kamparanoj kaj fabriklaboristoj definitive forpuŝis la reĝojn, heroojn kaj generalojn. Tiamaniere la *Naturalismo* estis la logika sekvo al la realismo. Ĝi estas realismo kun sociala karaktero. La artisto de tiu periodo kreis artverkojn kiuj kreskis en sia tempo. Li estis naturalisto ĉar la kondiĉoj devigis lin al tio. Kaj tiu naturalismo estos siavice la kaùzo de nova direkto : la *Impresionismo*. Jen kiamaniere. Ĝis tiam la pentristoj verkis siajn pentraĵojn en sia laborejo. La naturalistoj, se ili volis reprodukti la realecon, estis devigataj almenaù fari skizojn surloke. Tial ili ekmigris, kun pentrostablo kaj farbskatolo, kaj ekverkis en plena naturo. Tie la pentristoj estis unuafoje ravataj de lum-kaj ombroludajoj. Fino de la evoluo : ili faris tiujn-ĉi ombron kaj lumon *la celo*. Depost tiam ili volis esprimi nur impreson de tio kion ili vide travivis sur difinita loko, je difinita momento de la tago. Tiu-ĉi reproduktado de impresoj estas la impresionismo. La termino mem, kiu tiel trafe karakterizis pli malfrue la novan direkton, estis unue moknomo por verko kiun ekspoziciis Claude Monet en 1874 : « Impression, soleil levant » (impreso; leviĝanta suno). La karaktereca impresionismo de niaj regionoj kie la lumo estas filtrita per ĉiam malseketa atmosfero, kiu donas al ĉio perlgrizan nuancon en kiu ludas la sunlumo estas bonege reprezentita en la tielnomata « Haga Skolo » kun i.a. Mauve, Breitner kaj la fratoj Maris. En Flandrujo ni havis Emiel Claus, James Ensor.

Sed ree la nova generacio troigis· Oni komencis pentri la lumon mem kaj *nur la lumon*. Ili science analizis

ĝin : lumo estas trilaĵo; kaj koloro estiĝas per kunmeto de ĉefaj kaj komplementaj koloroj. Pro tio oni kunlokigis la kolorojn ne-miksitaj. De nun verda herbejo estis montrata metante bluajn kaj flavajn makuletojn unu sub la alia, por krei je ia distanco la impreson de trilanta verda ebeno. La objektoj tiel trilas ke fine ili iĝas senformaj. La plej puran formon de tia impresionismo kaj *punktilismo* (pointillisme) oni trovas en Francujo, kie en la suna sudo la koloroj estas puraj kaj freŝaj. Ankaù ĉe ni la punktilisma maniero estis sekvata : Theo Van Rijsselberghe. En Nederlando precipe Jan Toorop.

Sed ankaù la impresionismo plimaljuniĝis iom post iom. Oni klopodis renovigi. La reakcio alvenis : denove oni volis ion diri, ion esprimi. Tiamaniere la impresionismo devis malaperi por nova tendenco : la ekspresionistoj (esprimistoj). En Belgujo, Nederlando, Germanujo oni kontraùagis pure ekspresionisme; sed en Francujo kaj Italujo la kontraùa agado elfluis al esprima arto kiun oni nomas Kubismo, Simbolismo kaj Futurismo.

La *Kubismo* estas pentrotendenco bazita sur parolo de Paul Cézanne ke ĉio en la naturo estas reduktebla al kuboj, kegloj kaj cilindroj. Kelkaj eminentaj kubistoj estas : Bracque, Léger, Juan Gris kaj Picasso, kiu travivis brilan kubistan periodon. Ne ĉiu homo kapablas ĝui la kubismon. Mi supozas ke tio estas ĉar la kubisto pentras kun sia racio, sia intelekto anstataŭ kun sia sento. Li konstruas siajn pentraĵojn logike. Oni devas ŝati ritmon. Kubismo donas koloron, formon, linion.

La *Futuristoj* (precipe en Italujo) volis esprimi *la movadon* en siaj verkoj. Ĝi estas *dinamika* pentroarto. La futuristo ĉerpas la inspiracion precipe el la mondo de la tekniko. Ankaù Picasso partoprenis. Verdire li partoprenis al ĉio. Kaj en ĉiuj direktoj li estis elstara. Li pentris belegajn realistajn verkojn (en la tielnomata « blua periodo »). Li estis ankaù brila kubisto. El la futurista periodo datumas la verkoj pri kiuj laikuloj ridas volonte kaj multfoje, ĉar oni trovas sur ili okulojn, nazojn kaj orelojn kie ĉi-tiuj korpopartoj tute ne konvenas.

La *Simbolismo* havis siajn adeptojn precipe en Nederlando : Van Konijnenburg, Jan Toorop, Roland Holst.

La *Surrealismo* (tio kio estas super la realeco) estis sekvo de la simbolismo. Sed ĝi translokigis sian inspiracioterenon en la regiono de la revo kaj de la subkonscio (sub la influo de la psikanalizo de Sigmund Freud). La surrealisto havas sian propan, privatan mondon kaj mokridas la leĝojn de la pentroarto. Picasso, Paul Klee. Ĉe ni : Labisse kaj Margritte. Alia direkto estas ankaù la *Fauvismo* (sovaĝismo) kiu tute ne respektas la kolorojn de la realo. Inda reprezentanto estas ĉe ni : Rik Wouters.

Laù mi, la pura ekspresionismo estas kaj restos la ĉefa reakcio kontraù la impresionismo. Ĉi-tiu tendenco precipe en Flandrujo alte flugis. La grupo de LATEM estas konata malproksime trans la landlimoj. Nomo kiel Permeke, Gust De Smet, Frits Van den Berghe, Jozef Canté kaj aliaj estas mejloŝtonoj sur la vojo kiun nia arto trairis en la jarcentoj. Flanke de la surrealismo, la ekspresionismo estas la direkto kiu restis, kiu estis pli ol nura modo. Kubismo, futurismo, simbolismo; ili havas sian historian signifon. Ni povas stari antaù tiaj pentraĵoj kaj demandi al ni kion la artisto intencis per ili. Sed la ekspre-

sionisto kreas kaj trafas. Li pligrandigas kaj aliformigas la naturbildon tiel ke la plej karaktereca venas sur la antaùscenejo. Kiel ankaù la verkisto uzas bildojn, tiel la ekspresionisto trafas, kritike elektante la kolorojn kaj liniojn, por atentigi pri lia ideo. Ke multaj ekspresionistoj troigis? Certe! Sed rigardu la lastajn verkojn de Permeke: ĉio spiras poezion kaj profundan homecon. Vidu ankaù la monumenton de Anseele en Gent. Jozef Cantré lokigis « patron Anseele » tute meze de lia popolo, do tie kie li batalegis dum la tuta vivo. Li gvidis tiun popolon al pli bona vivo, al pli bela estonteco, al feliĉo. Tio estas ekspresionismo.

Ni klopodu kompreni kaj ŝati ĝin; ni travivos multe da belegaj horoj.

MARLEEN BOGAERT (studentino).

ESPERANTO KAJ FILATELIO

Sekve al artikolo, pri la Esperanto poŝtmarkoj, en nia antaùa numero, samideano E. PAESMANS el Antwerpen prave rimarkigis nin ke mankis ankoraù tri PM en la listo. Ni sincere dankas nian samideanon pro la sciigo kaj ĉi-sube kompletigas la koncernan tabelon.

Eldonjaro	Katalog-numero	Valoro	Koloroj	Detalaj informoj
		5. — *Ruslando*		
1930/33	456	3 r.	flavverda kaj brunnigra	Esperanto teksto troviĝas sur la PM : « Volhov H.E.S. Lenin » (Hidrolika Elektra Stacio Lenin).
		7. — *Triesto* (Libera teritorio — B-zono)		
1953	86	15 d.	bluverda kaj verda	memorigo pri la 38-a UEA Kongreso en Zagreb (PM kiel tiu de Jugoslavio kun surstampo STT VUJNA)
1953	A 20	300 d.	violkolora kaj verda	idem.

1907 – La Verko De La Sciencistoj
LA AFERO IDO

artikolo verkita de
PETER BEISWANGER

Ŝajnas necese eĉ remalfermi ĉapitron malĝojigan kaj malklaran, se ĝi estas tiom instrua. Mi pensas ja ke ĉiu mondlingvano nepre konu la historion mondlingvisman, almenaù ĝiajn ĝeneralajn tendencojn kaj la multajn danĝerojn kiuj minacas ĝin de interne. Ne ekzistas neùtralaj studoj pri tiu temo, kaj mi kolektis ĉiujn faktojn nun disponeblajn por trovi kelkajn novajn aspektojn.

En 1900 la matematikisto Léopold LEAU publikigis « Une Langue universelle est-elle possible? »; kaj tiu broŝuro trovis varman konsenton de la fama Franca filozofo Louis COUTURAT (1868-1914), pioniro de la tiel nomata logistiko aù logiko matematika. Spirito klara, universala kaj energia, li estis posteulo de Leibnitz, kiun li studis dum multaj jaroj kaj kies ideojn pri Lingvo Algoritma li verve transprenis. La du homoj sin ĵetis senhezite en la ampleksa laboro; studi kaj juĝi la projektojn jam ekzistantajn. Rezultis el tio la fondo de la « Délégation » (1901) kaj du dikaj volumoj « Histoire de la Langue Universelle »; kaj post kvar jaroj « Les Nouvelles L.I. » (1907). Kun sia ardo kutima li sukcesis ricevi por sia entrepreno la aprobon de 310 societoj ĉiulandaj kaj subskribon de 1250 membroj de akademioj kaj universitatoj. Oni elektis en junio 1907 komitaton de 12 eminentaj sciencistoj de diversaj lingvoj kaj fakoj. En oktobro (15-22) ĝi kunvenis 18 fojojn en Parizo « por adopti internacian helplingvon ». Elektita prezidanto : la Berlina astronomo Förster; efektiva prezidanto : la Nobelpremiita kemiisto Wilhelm Ostwald, homo tre sprita kaj lerta. Ĉeestis la lingvistoj Baudoun de Courtenay kaj Otto Jespersen, la Esp. E. Boirac, Gaston Moch kaj P. Rodet, la fama matematikisto el Torino Giuseppe Peano (Latino sine flexione), la Brusela lingvisto Monseur por Neutral kaj por Esperanto la matematikisto markizo Louis de Beaufront kiel persona anstataùanto de Zamenhof.

Couturat kaj Léau en 210 paĝa raporto prezentis ĉiujn kritikojn, dezirojn, proponojn. La kunsidoj okazis matene kaj vespere, kaj estis ŝtopitaj de laboro. Triono de la tempo estis dediĉata al Esperanto, kaj al projekto sennome disdonita jam en la unua tago sub la pseùdonimo IDO kaj en formo de « Grammaire complète » kun ekzercaro kaj vortaro specimenaj (presita je 200 ekzempleroj). La aùtoro restis nekonata dum pluraj monatoj kaj la projekton defendis Couturat. Oni kritikis en nia lingvo la supersignojn, pronomojn kaj la derivadon, punktoj ŝanĝitaj en la projekto Ido. Tiel la komitato koncentris sian intereson al tiu projekto kaj decidis fine unuvoĉe (kun la voĉoj esp!) ke ĝi ne povas adopti « bloke » unu lingvon, sed ke principe ĝi konsentas kun Esperanto ŝanĝota laù proponoj de la projekto Ido. Atentu ke ne estis iu kaùzo por ekscitiĝi! Sed bedaùrinde oni eltrovis

fakton nekredeblan kaj tute ne atenditan : la markizo estis la aùtoro. Li estis do preparinta la projekton jam antaùe kaj samtempe akceptinta la komision de Zamenhof. La nudaj faktoj !

Kaj nun la esperantistoj en sia konsternita kolero faris ion eĉ pli bedaùrindan : ili rompis ĉiun diskuton kaj deklaris la « Délégation » ne ekzistanta, kvankam Zamenhof kaj Boirac estis antaùe akceptintaj la decidon de la Komitato. La vojoj de la du movadoj disiris kaj fine la personaj kalumnioj ne ĉesis flugi tien kaj reen.

Kelkaj rimarkoj pri Beaufront. Mi ne povas aprobi lian konduton. Mi devas tamen konstati ke nek lia persona nek lia profesia vivo portas ian pluan makulon. Li estis konscienca katoliko kaj ni ne povas kontraùdiri lian bonan volon (kiel ja ankaù ne tiun de la komitato) por trovi la plej bonan solvon. « Adminime, en ica rolo, me povis deturnar shimo de E. : esar repulsata tote simple kom ne posedanta la qualesi necesa a helpolinguo. ». Sed tiu argumento estis nur preteksto. Ni eble povas respekti liajn volon kaj intencon, sed neniam la rimedojn kaŝitajn, kiuj devis fini en la fatala rompo de la jaro 1908.... Same mi riproĉas al Boirac ke li ludis duoblan rolon; ke ofte S-ro Boirac « prez. de LK » neis S-ron Boirac « ano de la Délégation ». Ĉio estas vere bedaùrinda. La afero rompis multan porcelanon en scienculaj medioj koncerne Lingvon Internacian.

La Idistoj, nun solaj, fondis revuon « Progreso », kies senlaca redaktoro restis ĝis sia morto (en 1914 en aùtomobila akcidento) Louis Couturat. Surprize, la lingvo baldaŭ atingis fiksan formon malgrau ampleksaj diskutoj. Kion oni ŝanĝis ?

(*a*) Forigo de la supersignoj ĉ/ch; ŝ/sh; ĝ/j/j; j/y. Maloftaj diftongoj ai..., au.... Krome x, qu, w.

(*b*) Akcento ne sur ia..., ua....

(*c*) Forigo de la akuzativo, escepte ĉe inversigo.
-i anstataŭ -oj. Adjectivo neŝanĝebla ekz. « Granda domi ».

(*d*) Infinitivo per -ar, -ir, -or (portantaj akcenton) analoge al -as, -is, -os ktp. -ez anstataŭ -u.

(*e*) Pronomoj me, vu (tu)
lu ni, vi, li onu.
elu, ilu, olu eli, ili, oli
Eliziebla estas -as, -a kaj -u (ĉe on, el, ...).

(*f*) Forigo de la Zamenhofa tabelo per ekz. sempre, quale, omno, ula qua kiu quo kio qui
ca ĉi tiu co ĉi tio ci pluralo
ta tiu to tio ti

(*g*) Precipe la derivado esp. ŝajnis ofte ne sufiĉe scienca. Oni derivas nun de richa : richo kio estas riĉa, do riĉulo; de plana : plano kio estas ebena. Ruina kastelo, sed ruin*ala* vizitanto, ĉar la kastelo *estas* ruino, la vizitanto nur *rilatas* ĝin. Per -al oni formas universala, radikala, morala, normala, nazala, sociala, finala. Oni anstataŭigis ek- kaj iĝ- kune per -esk kaj oni enkondukis -iv, -oz, -iz, -ur krome.

Por fini, unu teksto : « La problemo de artificala linguo ne esas linguala ma (= sed) sociala. Semblas evidenta, ke esas posibla konstruktar linguo, qua satisfacus la demandi di internaciona relati; fakte, me kredas, ke irga (= iu ajn) de la sistemi diskutata dal mondlinguani servus ta skopo (= celo). Helpez do per honoroz kombato, frati sur la tero sospirant al felica e (= kaj) vinkoza fato, quan meritas linguo unigant.

Ĉu vi volas gajni 10.000 frankojn

Al tiu ĉi demando, farita en nia antaŭa numero, kelkaj legantoj niaj respondis per la ensendo de artikolo pri nia Ekspozicio Bruselo 1958 ; ili fakte rigardas ĝin ĉiuj el alia angulo ; kio estas plej interese.

Parton de ili ni presigas en la nuna numero. La aliaj aperos en la sekvonta.

Ni deziras al la verkintoj plej grandan sukceson en la konkurso, organizita de la " Asocio de Belgaj kaj Eksterlandaj Periodaj ĵurnalistoj ", kiu propamove decidis ke ankaŭ artikoloj presitaj en Esperanto povas esti ensendataj.

* * *

atom-sfero kaj atmo-sfero

— **E pluribus unum !**
(Multo unuiĝu !)
Devizo de Virgilio.

La situacio de la multnombraj ŝtatoj, kiuj ekzistas en la homaro, estas komparebla kun tiu de la diversaj familioj kaj personoj, kiuj konsistigas ŝtaton. Sed tamen inter tiuj du niveloj montriĝas esenca diferenco : nek la familioj, nek la unuopuloj, nek eĉ la ĉiuspecaj asocioj kapablas esti sendependaj, se ili deziras realigi la celon de la vivo, tiel kiel la racio ĝin postulas ; la ŝtato, male, estas perfekta socio, ĉar ĝi estas fundamente grupiĝo da homoj, starigita kun la celo esti sendependa en ĉiuj cirkonstancoj de la vivo. Jena koncentriĝo de popoloj kaj ilia relativa nedependeco estas natura fenomeno, ĉar montriĝas utile, ke la homoj ekspluatas ĉiujn partojn de la tero. Kvankam tio kaŭzas neeviteblajn disiĝojn, specialiĝojn en rasoj kaj funde malsamaj socioj, ni tamen devas konsideri kiel permesita tiun formigon de multaj perfektaj socioj.

Ekde tiam ankaŭ evidentiĝas, ke ĉiu ŝtato havas du taskojn :

Negativa devo ĝin devigas, respekti la praktikadon de la fundamentaj rajtoj de la aliaj ŝtatoj kaj entrepreni nenion, kio povus malutili al ili ; tiel, ĉies rajtoj reciproke limiĝas.

Sed pozitiva devo postulas, ke la ŝtato kunlaboru kun la aliaj, unuiĝu kun ili kiel eble plej multe per interkonsentoj pri reciproka helpo, kun la celo, atingi kulturstadion pli superan ol tiu, alirebla de ĉiu unuope.

Tiel longe, kiel la devo restas negativa, la internacia socio restas senorgana : temadas pri dispecigo de la homaro en perfektaj socioj, havantaj inter si nur rilatojn de suverenaj unuoj, tute liberaj kaj sendependaj.

Sed kiam la cirkonstancoj iĝas tiaj, ke la kulturstadio, atingita per internacia reciproka helpo estas pli alta ol la perfekteco, realigita fare de la izolitaj ŝtatoj, kaj precipe, kiam la individuaj ŝtatestroj iĝas nekapablaj, plene realigi sian propran mision, t.e. gardi la komunan nacian bonon, ne konsiderante siajn rilatojn kun la aliaj popoloj de la mondo, tiam la devo pri reciproka helpo pozitiviĝas kaj postulas la formiĝon de socio vere internacia, t.e. organa.

Nu, tia estas ĝuste la nuna situacio de la popoloj de la mondo.

La unua kondiĉo realiĝas en ĉiuj popoloj sen escepto : ĉu el ekonomia, ĉu el intelekta vidpunkto, la reciproka helpo alkondukas al ĉiu riĉaĵojn nealireblajn al iliaj propraj klopodoj : la tiel nomataj " postrestaj " popoloj forte sentas tion per la alveno de la modernaj eltrovaĵoj kaj la aplikoj, kiujn ili ebligas por la kuturo aŭ la industrio: kaj la civilizitaj popoloj estas tiel tributdevaj unuj al la aliaj, ke ili ne povus repreni sian izolitecon sen grava malutilo por si mem kaj por la cetero de la homarana komunumo.

La dua kondiĉo, ankoraŭ pli urĝa, emas pli kaj pli universaliĝi kaj jam ĝi senkonteste montriĝas reala en du fundamentaj punktoj :

a) por la konservado de la paco, ĉar la moderna milito apenaŭ povas resti lokalizita, kaj ekde kiam ĝi koncernas la grandajn ŝtatojn, ĝi influas sur la tuta mondo. Multaj popoloj devas toleri ĝin kontraŭvole kaj ĉiuj suferas pro ĝi en sia prospero. Tiel, neniu ŝtatestro kapablas pace okupi sin pri la efektivigo de siaj sociaj devoj, ne unuigante siajn klopodojn al ĉiuj aliaj por kontinuigi la internacian ordon.

b) la samon ni konstatas por la ekonomia prospero : ĉiuj malgrandaj popoloj multe ŝuldas al siaj grandaj najbaroj, kaj multfoje ili eĉ ne povus vivi sen ili ; jes, eĉ por la grandaj popoloj, kiuj, dank'al siaj senmezuraj rezervoj (kiel Rusujo aŭ Usono) kaj sia kolonia imperio (kiel Anglujo aŭ Francujo), povus, se tio estus necesa, vivi sole, tia izoliteco — per la nuna progreso de la interŝanĝoj — ruinigus ilian prosperon : la ŝtatestroj ne povas elekti aŭtarcian politikon se ili ne volas preterlasi siajn devojn.

Estas do vere tempo, por ĉiuj popoloj de la tero, formi veran internacian socion, kaj tiu ĉi devas iĝi organa. Ĝis nun Germanujo fabrikis rad-arojn, Anglujo montrilojn kaj Francujo ciferplatojn. Sed, ne unuiĝinte, tiuj eroj neniam konsistigos horloĝon. Kaj tamen, ĉiu deziregas ekvidi organon : ĉiuj unuopaj ŝtatoj formu komunumon kun propra aŭtoritato kaj eĉ propra registaro, kun la celo atingi la komunan plej altan bonon por la tuta homaro.

Tial estas ĝojige, ke malgranda kopio de tia internacia perfekta socio estos dum pluraj monatoj videbla sur la Brusela Hejsel-stadiono. Belgujo, malgranda sed energia kaj persista lando, tie ĵus malfermis la plej mirigan ekspozicion de la modernaj tempoj. Miriga ĝi estas ne nur per sia amplekso kaj sia aspekto : ĝi ankaŭ mirigas pro la ĉefideo kiu ĝin regas : la humanismo. Tio signifas, ke la

ekspozicio ne kuŝas sub la signo de la teĥniko, sed de la homo. Ĝia temo ne estas la supereneco, sed la pozitiva, paca interkompreniĝo kaj interŝanĝo inter ĉiuj popoloj de la tero. Ĝi prezentos, flankon ĉe flanko, miniaturan projekcion de preskaŭ ĉiuj ŝtatoj, kiuj kune penos, per internacia kunlaborado, vidigi la plej bonajn rimedojn por humanigi kaj klerigi la homaron.

Ni devas ĉi tie pripensi, ke la kulturo ja estas nia ĉefa bono, sed ke ĝi nur eblas, kiam bonaj materiaj cirkonstancoj ĝin ebligas. Tial, la komuna mondskala bono, supre priparolita, vidiĝos en Ekspo 58 sub **ĉiuj** ĝiaj aspektoj : unue, pli perfekta maniero por kontentigi ĉiujn materiajn bezonojn, ĉu en la tereno de la nutrado, ĉu en tiu de la industrio k.t.p. ; plue, pliriĉigo intelekta kaj arta per reciproka helpo por la sciencaj malkovraĵoj kaj la teĥnikaj aplikadoj ; ankaŭ plifortigo de la morala nivelo de la homaro per la akceptado de mondampleksaj reguloj pli humanaj, pli konformaj kun la natura idealo de la bono, la vero kaj la belo : finfine, pli bona politika organizado, tute adaptita al la progresoj de la internaciaj rilatoj.

Tiamaniere, kiel heroldo de estontaj evoluoj en ĉiuj terenoj de la homaj pensado kaj aktiveco, nia patrujo hodiaŭ al la mirigita mondo pruvas sian grandan entreprenemon, sian kuraĝon kaj sian eksterordinaran organiz-povon.

Estas precipe la teĥnikaj mirindaĵoj kiuj donos al ni bonan instruon : Pasteur kaj Curie kapablis, **mem** prizorgi siajn eksperimentojn. La nuna ekspozicio evidentigas, ke la hodiaŭa scienco nur povas bone progresi se ĉiuj popoloj kunlaboradas. La Sovetaj " Sputnik "-oj kaj la Usona " Esplorer " ja ambaŭ parolas germane. Tial, ni per Ekspo 58 ne konstruis maŝinon, sed kulturis vivantan kreskaĵon . . .

Ekspo 58 : grandskala harmonigo de la tutlandeco kun la tutmondeco ! Ne plu unuope disen, sed kune antaŭen !

Ekspo 58 : turnplato de ĉiuj spiritaj kaj materiaj deziroj de la popoloj, grandaj kaj malgrandaj ; vojkruco de ĉiuj aktivaĵoj de nia terglobo ; ne fandvazo, sed ĉielarko de koloroj kaj kunfluoj ĉiuspecaj!

Ekspo 58 : ne plu eksperimento, sed grandega kaj impona realaĵo, tutmonda rendevuo de ĉiuj bonaj voloj, pilgrimejo de nia jarcento !

Ekspo 58 : nerefutebla atestaĵo de la universeco kaj konsekvenco de la frateco, nepre bezonataj por la mondpaco.

En ĉi tiu glorplena jaro, Belgujo elokvente montros sian prestiĝon kaj sian iniciaton : ĝia senantaŭa disradiado lasos en la koro kaj de la belgoj kaj de la fremduloj entuziasman memoron !

Pluribus E.

ekspo 1958 kaj ni

La 17an de aprilo 1958 ! Estis granda tago, la tago " E. ", la tago, kiun ĉiuj atendis kun diferencaj sentoj, laŭ sia propra animstato kaj humoro, sed je kiu neniu povas resti indiferenta.

Ĉu ne, dum monatoj kaj monatoj, oni laboris, laboregis por ke la nuna Universala Ekspozicio estu inda de la reputacio de la belgoj, reputacio kiu proklamas nian popolon laborema, kuraĝa, obstina, malgraŭ ĝiaj kelkaj malvirtoj, kiujn la belgoj mem unuavice primo-

kas ? Sed, ni silentu pri malecoj. Estas festotago ! Kaj ni danku ĉiujn, kiuj kunlaboris por krei, en limigita tempo, tiun ĉi mirindaĵon. Ni antaŭ ĉio danku la 53 naciojn kiuj, per la giganta tasko, kiun ili prenis sur sin, por elmontri en plej ĉarmaj kadroj la plej interesajn produktojn de sia agrikulturo, tekniko, industrio kaj artoj, pruvis kiel alte ili taksas la valoron de Belgujo.

Ni danku, ni ĝoju, ni fieru, ni esperu ! . . . Espero, Esperanto . . . ĝia interna ideo !

Jen la kampo, sur kiu Esperantismo kaj Universala Ekspozicio renkontiĝas, kunfandiĝas.

Emociita, mi aŭskultis tra la radio la paroladojn dum la inaŭguro, kaj kaptis por daŭra memorado la sagajn parolojn, inter alie de nia ĉefministro kaj antaŭ ĉio tiujn de nia juna Reĝo. En sia parolado Reĝo Baŭduino citas :

" La homaro eniris novan epokon de sia historio. Pli ol iam la civilizacio ŝajnas esti regata de la scienco. Fortoj, de kies potenco neniu, — antaŭ kvaronjarcento, — estus kuraĝinta imagi al si nur la ekziston, nun troviĝas je la dispono de la homoj. Sed du vojoj aperas antaŭ ni : tiu de la rivaleco, kiu estigas vetkuradon al ĉiam pli danĝeraj armigadoj, kiu minacas uzi la malkovrojn de la geniaj scienculoj kontraŭ la homaro, kaj tiu, kiu permesos, — kiaj ajn estu la diferencoj en la sociaj, politikaj kaj spiritaj konceptoj, — elekti la vojon de la interkompreno, la nure kapabla por konduki al vera paco ".

Kiel mi ĝojis, pensante ke, — je la sama momento, — miloj da gesamideanoj, ĉu Esperantistoj, ĉu re-konantoj de la lingvo Zamenhofa, aŭskultis kaj aprobis same kiel mi. Ĉu ne estas bedaŭrinde, ke je ambaŭ flankoj oni tiel longe prezentis Okcidenton kaj Orienton, kiel nekunigeblajn antagonistojn ? Nin, Esperantistojn, oni ne povis konvinki per tiu aserto. Certe la konceptoj pri vivmaniero, ekonomio, socio ne estas identaj ĉe ĉiuj popoloj, sed tio ne signifas malamikecon.

La Universala Ekspozicio malfermiĝis je la oportuna momento, por ke la homoj, apartenantaj al tiom da diferencaj nacioj, pli alproksimiĝu, ekkonu kaj reciproke estimu unuj la aliajn, por ke ĉiuj respektu la honestajn konvinkojn de la aliaj kaj admiru la klopodojn kaj sukcesojn, per kiuj la aspekto de la mondo ŝanĝiĝas en nemezurebla ritmo.

Tagoj jam forpasis. Kaj ĉiu, kun granda intereso, ekaŭdas la detalajn raportojn pri iu aŭ alia okazintaĵo kaj ĝoje konstatis ke la entuziasmo ne malpliiĝas. La bildoj, kiuj ilustras la artikolojn, senescepte, montras la radiantajn mienojn de la vizitantoj.

Kelkaj flustris ke sur la Heysel, oni tro oferis al la modernismo, precipe laŭ arhitektura kaj kolorkombinoj. Oni povas ne ŝati la ultra-modernajn esprimojn en la arto, sed oni tamen devas konfesi, ke Universala Ekspozocio estas la plej bone elektebla loko por ilin konkrete prezenti.

Kaj ni estu dankaj al la organizantoj kaj eltrovintoj, kiuj per plej agrablaj, klarigaj rimedoj provas iomete komprenigi la plej simplajn el la sekretoj de la novaj sciencoj al la granda amaso de la interesiĝantoj.

Ni, Esperantistoj, iru ofte al Bruselo. Por nia propra plezuro, sed ankaŭ por esti kapablaj priskribi ĝin kun sincera entuziasmo al niaj malproksimaj geamikoj en la tuta mondo. Ni invitu niajn gesamideanojn kaj certigu al ili, ke, krom la sennombraj ekspozataj kaj demonstrataj novaĵoj multegaj manifestacioj kaj konferencoj oferos programojn por kontentigi ĉiujn.

Ni ne forgesu la allogan " Gaja Belgujo ". Apud la plej modernaj realigaĵoj renaskiĝis tie la vivo de la " bela epoko ", kiam nek troigitaj ambicioj, nek neindaj envioj ombrigis la animojn de niaj geavoj, kiuj ofte forgesis siajn ĉiutagajn zorgojn en Breughelana gajeco.

Multo ŝanĝiĝis kaj multe pliboniĝis la vivkondiĉoj. Ni ĝoju kaj rememoru pie la praulojn, sed ni certe fidu la nunan junan generacion ; kaj ni kredu al plibeligota estonteco por la tuta unuigita homaro.

Trikoloro.

Belgujo antaŭ la forumo

Flugantaj pensoj ĉirkaŭ EKSPO '58.

Kiam, ĵaudon la 17an de aprilo, malfermiĝis la Universala Ekspozicio, estis sendube neniu Belgo, kiu ne sentis ian emocion, ian fierecon. Emocio, ĉar kun la Ekspozicio, malfermiĝis nia lando por la tuta mondo, kun la organizado de la unua Universala Ekspozicio post la milito, Belgujo metas sin antaŭ la forumon de la tuta mondo. Fiereco, ĉar estas nia malgranda Belgujo, kiu kuraĝis preni sur sin la organizadon de la grandioza manifestacio, kiu havas kiel temon " La Homo kaj liaj Realigoj ". Kaj tiu celo estas benita, ĉar plej bona reciproka kono rezultos el tio, kaj reciproka konatiĝo certe devas konduki al reciproka alproksimiĝo.

Ne estas potencplena ŝtato, kiu kunvokas la mondon, por rigardi la laboron kaj la penadojn de ĝiaj enloĝantoj. Estas la trianguleto, apenaŭ videbla sur la globo, kašita meze de siaj gigantaj najbaroj. Estas tiu parto de la malnova kontinento, kiu jam tiel ofte en la daŭro de la jarcentoj, estis la scenejo kie la popoloj-najbaroj batalis siajn disputojn.

Ĉu eble iuj el la gigantoj proksimaj aŭ malproksimaj, ne miris pri nia kuraĝo ? Ĉu ne iuj pensis, ke nia malgranda lando estas kiel infano, kiu emas sin konsideri plenkreska, kaj volas agi kiel plenkreskulo, ĉefe por konvinkigi sin mem ? Eĉ se en Belgujo jam ofte okazis Universala Ekspozicio.

Sed, ĉu ankaŭ ne eblas ke ekzakte pro la fakto, ke nia lando estas tiel malgranda, ni povos fari pli por la alproksimigo de la homaro, ol povus fari granda nacio ?

Sur la Heizel, ĉirkaŭ la festpalacoj de la Ekspozicio de '35, nun efektiviĝas, post longdaŭra preparado, la unua Universala Ekspozicio post la milito. Kaj la intereso en la tuta mondo estas multe pli granda, ol iam antaŭe. Tiu intereso klare respeguligas la veran bezonon de la tuta homaro al interkonatiĝo kaj interkompreno.

Dum ses monatoj la mondo povas — plej vaste — konatiĝi kun la homaj realigaĵoj. En la pli ol dudek jaroj, kiuj forpasis post la lasta

Ekspozicio, tre multo okazis. Dum la lastaj jardekoj, la tekniko kaj la scienco travivis verajn revoluciojn : ektroviĝis fortoj, energioj, pri kiuj oni antaŭ nur tre mallonga tempo apenaŭ kuraĝis penseti.

Pri tiuj realigajoj, kiuj povas esti uzataj por la bono kaj la beno de la mondo, sed malfeliĉe ankaŭ por ĝia detruigo, kaj pri ilia uzado, devas decidi la homoj mem, kiuj havas en la manoj ambaŭ eblecojn : tiu de la feliĉigo kaj tiu de la detruo de la individuoj.

Ekzakte tie la Ekspozicio povas montri, kaj devas montri al ĉiuj nacioj, disŝiritaj pro malsamecoj de ideoj, politiko kaj sociaj cirkonstancoj, la vojon sekvotan. Rigardante la mirindajojn jam akiritajn, oni facile povas diveni kio rezultos, se ĉiuj nacioj kunlaboros por faciligi la vivon sur la tero. Klare videbliĝas en Bruselo la vojo, kiun devas sekvi la homaro, kiu disponas pri tiuj eble ne jam plene kontroleblaj energioj, kun kies ektrovo komenciĝis nova tempo. Kaj ni konsideru kiel simbolon de tiu nova tempo, la Atomium, kiu tronas meze de la Ekspozicio, videbla jam de malproksime.

Ne nur la materiaj realigajoj havas valoron en la mondo, ankaŭ la nuraj spiritaj valoroj estas same gravaj. Tial ĉiu nacio ne nur sendis la artverkojn, kiuj plej tipe reprezentas la kulturan vivon de sia lando. Sed ankaŭ alvenis el ĉiuj anguloj de la mondo, la plej multvaloraj artpentrajoj, jam dum jarcentoj gardataj kiel trezoroj, sed nun kunigitaj por ke la mondo havu la okazon admiri, kune kaj komune, la postlasatajn belajojn de longdaŭra civilizacio. Kaj en la daŭro de la Ekspozicio venos al Bruselo famaj orkestroj, orkestestroj, interpretistoj, kiuj aŭdigos al Amerikanoj kaj Rusoj, al Germanoj kaj Japanoj la majstroverkojn novajn kaj malnovajn de la muziko. En la sfero de la Ekspozicio la aŭskultantoj sentos sin unuigitaj sub la sonoj de la muziko, kiun ĉiuj komprenos same, kiel lingvon internacian.

Kiam finiĝos la Ekspozicio, post la grandskala reciproka interkonatiĝo, kia estos la konkludo de la mondo ?

Ĉu la nacioj restos apartigitaj en malfido reciproka, kaj daŭrigos la danĝeran ludon kun la justrovitaj energioj — kiel infano ludanta kun alumetoj, kaj ne rimarkanta la danĝeron — tiel ke endanĝeriĝu nia terglobo, baldaŭ sanceliĝante sub la tondraj eksplodoj.

Aŭ ĉu ni povas esperi ke la belga iniciato estis unua, jam longe de ĉiu individuo sopirita, instigilo al iom post ioma kunlaboro de ĉiuj nacioj, malgraŭ la gravaj baroj, ĉu politikaj, sociaj aŭ ekonomiaj. Se tio okazos, la mondo baldaŭ vivos en nova epoko. Epoko en kiu la scienculoj de la tuta mondo en plena kunlaboro, povos uzi siajn fortojn por la plifaciligo de la vivo surtere, ne perdante tempon pro reciproka nacia malfido, kaj certe ne uzante siajn fortojn por la ruinigo de mondo, kiun ili kapablas kaj devas plibeligi.

Tiamaniere ni postlasos al la generacioj kiuj sekvos la nian, la enviindan heredajon de mondo libera kaj paca, kun popoloj liberaj, fieraj pri siaj propraj kulturoj kaj realigajoj, sed kun malfermita okulo por la kontribuoj de aliaj nacioj al la komuna bono kaj bonfarto.

Esperu ni el nia tuta koro, kaj kunlaboru ni Belgoj, por ke ĉiuj vizitantoj reiru al sia lando kun la sama emo al paco, trankvileco kaj libereco, kiun sentas ni. Tiel ke la belga iniciato kontribuu al la naskiĝo de renovigita mondo — La Mondo de Morgaŭ.

Elvodovo.



Nur du partoprenintoj al la konkurso de nia unua numero faris eraretojn. Ĉiuj aliaj korekte solvis. Ni tamen esperis je pli grandskala partoprenado, tutspeciale de la genovuloj. Ĉu ĉiuj genovuloj jam posedas sufiĉan vorttrezoron ? En la venonta numero ni komencos publikigon de la ranglisto de la gepartoprenintoj. Jen la ekzakta solvo de la enigmoj :

1) Papo — aren' — perd' — ondo.
2) *a*) Kamelo — amelo — melo.
   b) Nomaro — omaro — maro — aro.
3) necesa — komitato — malamo — ĉiclo — falsa — cimo — sama. « La komenco estas ĉiam malfacila ».
4) flut' — tine' — eter' — ring' — grak' — kret' — tiar' — ruin' — nadl' — lens' — sepi' — ikon' — naft' — torf'.

Kaj nun al la laboro por la nova tasko !

I. — AĴO — AM — ARO — AS — BO — BRO — BRO — ĈI — DO — ES — ĜI — IL — IST — KI — KLO — KO — LIN — LUN — MO — MO — NOK — NOR — OM — ON — OR — OS — PIN — REK — RIS — ROM — SUL — TA — TI — TO — TO — TRO — TRO — TRO — VAR — VEN.

El la ĉi-supraj 40 silaboj formu 20 dusilabajn kaj kvinliterajn vortojn kun la sekvantaj signifoj :

1. gardi kaj zorgi etulon 2. mallarĝa terkolo inter 2 maroj 3. ne kurba 4. instrumentaro 5. principo starigita kiel regulo aŭ modelo 6. parfuma substanco odoranta kiel mosko 7. akuta kaj pinta ekstremo 8. punmortigi iun sen juĝista verdikto, laŭ usona kutimo 9. pli malpli plena manko de lumo 10. provi fari ion malgraŭ la ebleco de malsukceso 11. frato de patro aŭ patrino 12. rekta fosaĵo farita per plugilo en la tero 13. iu, kiu posedas efektivan ordonpovon 14. tempo dum kiu la suno estas sub horizonto 15. havigi al iu kompenson por suferita malbono 16. planedo 17. tago de la semajno 18. duklapa manĝebla molusko 19. geometria figuro 20. verkajo el multekosta metalo farita.

Rimarko : la komencaj literoj de la vortoj de 1 ĝis 20 formas proverbon.

II. — Por la pacienculoj.

Laŭ la ĉi-subaj difinoj oni devas trovi en la 1-a vico kaj en la 3-a vico ĉiam triliterajn substantivojn kaj en la meza vico sesliterajn substantivojn. Por plifaciligi la taskon oni scias ke : 1) per la ses literoj el la meza vico oni ĉiam kapablas

formi la 2 vortojn el la 1-a kaj 3-a vicoj intermiksante la literojn. Samkompreneble oni kapablas ĉiam trovi la mezan vorton se oni intermiksas la ses literojn de ambaŭ vortoj el la 1-a kaj 3-a vicoj. 2) La komencliteroj de la mezaj vortoj de 1 ĝis 32 formas tre konatan proverbon.

Tasko : 1) serĉu la 64 triliterajn vortojn 2) la 32 sesliterajn vortojn 3) la proverbon.

Kaj jen la diversaj difinoj.

1-a vico	meza vico	3-a vico
1. fandita bestgraso (R)	ludproblemo	sovaĝa eŭropa bovo
2. organo (R)	diaĵa respondo (R)	parto de konstruaĵo
3. gento (R)	marfiŝeto (R)	preparita felo (R)
4. remburita cilindro el pelto (R)	granda venko (R)	religia ceremoniaro (R)
5. nerva musklokuntiro (R)	malsano	parteto
6. dombesto (R)	korpoparto	metalo
7. trinkilo (R)	pruvsigno	trinkaĵo
8. parto de veturilo (R)	korpo de mortinto (R)	malplenaĵo (R)
9. metalo	paroladisto (R)	rodulo (R)
10. planedo (R)	malpeza plumaro	faro
11. mitologia figuro	propono de varo	taĉmento (R)
12. trinkaĵo	tagparto	brakparto (R)
13. vesto (R)	speco de metalo	rimeno (R)
14. frukto (R)	meblostilo	inklino
15. grasa fluidaĵo (R)	subtera vojgalerio	mezurunuo (R)
16. unuo de elektra rezistanco	detala plibeligaĵo	amfibio (R)
17. alta herbo (R)	dolĉa suko (R)	kaptilo (R)
18. monato (R)	diverskolora glazuro	fluidaĵo (R)
19. birdo (R)	reĝo el antikva ŝtato (R)	fundo (R)
20. planedo (R)	profesortitolo (R)	korpoparto (R)
21. faro	birdo (R)	cilindro (R)
22. parto de planto (R)	muzikinstrumento	kolekto
23. ludkarto	lernolibro	longa lignopeco (R)
24. konstruaĵo (R)	birdo el pasero-ordo	aŭdebla aervibrado (R)
25. melodio (R)	insekto	kolekto da leĝoj (R)
26. rodulo (R)	blua farbo (R)	malmoliĝinta haŭto (R)
27. mola hararo (R)	mambesto	volplenumo (R)
28. aspiro (R)	haŭtŝvelaĵo	sovaĝa bovo
29. blanketa likvaĵo en la intestoj (R)	angla monero (R)	ujo (R)
30. plenda ekkrio	grada aliformiĝo	homo
31. pezo de ĉiuspeca envolvo (R)	severa estro	idonaska estaĵo
32. marŝo	konstelacio	frakcio

Solvojn oni sendu antaŭ la fino de la monato al S-ro M. Jaumotte, Avenuo De Bruyn 44, Wilrijk, Antverpeno.

BELGA KRONIKO

Prezidanto : S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.
Vicprezidanto-Kasisto : S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
Vicprezidantino : S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
Ĝenerala Sekretario : S-ro H. Sielens, ,,Internacia Marista Domo", Falconrui, 21, Antverpeno.
(Poŝtĉeknumero : R.B.L.E. : 13.37.67)

1907 - 1957

La Jubileo de la Karloreĝa Grupo Esperantista

Dimanĉo, la 27a de aprilo estis granda tago por la Karloreĝa Grupo Esperantista, kiu festis sian Oran Jubileon.

Fakte la Grupo fondiĝis la 11an de novembro 1907, sed la festoj estis prokrastataj ĝis post la vintra periodo.

Kaj multnombraj venis la delegacioj de ĉiuj la grupoj de R.B.L.E. en la lando.

Ili estis bonvenigataj en la belega salono de la « Grand Café de la Bourse », je la 10a matene, de la prezidanto S-ro de Cuyper ; de la sekretario S-ro Paulus kaj de nova kunlaboranto S-ro Devillez, kiu transdonis al ĉiu sian insignon kaj ankaŭ beletan broŝuron, kiu enhavas plenan historion de la Karloreĝa Grupo Esperantista.

Solena kunsido.

Je la 10a 30, malfermiĝis la solena kunsido, kiun prezidis Grafo G. de Cuyper, ĉirkaŭata de S-ro M. Jaumotte, prezidanto, S-ino J. Plyson kaj S-ro J. Soyeur, gevicprezidantoj de R.B.L.E., kaj S-ro R. Paulus.

La prezidanto bonvenigis la multajn ĉeestantojn, dankis ilin pro ilia partopreno en la festoj kaj skizis poste detale la historion de la Grupo. Li memorigis la pioniron S-ron Roelandt — kiu, jam en 1898, starigis rondeton en la apuda Gilly — kaj la prezidantojn, kiuj laŭvice gvidis la grupon : S-rojn Delvaux, Henraut, Cafonette, Delforge, Juste kaj Paulus, kiu, dufoje jam, estis prezidanto de 1939 ĝis 1944 kaj de 1949 ĝis 1957.

Li tiam transdonis la parolvicon al la delegaci-estroj, la gvidantoj de la grupoj, nome S-ro Soyeur, nome de la Lieĝa Grupo ; S-ro Ch. Poupeye, prezidanto de la Bruĝa Grupo ; S-ro R. Jacobs, nome de la Brusela Grupo, kaj S-ro J. Verstraeten, sekretario de la Antverpena « La Verda Stelo ». Ĉiuj gratulis la grupon kaj ĝiajn gvidantojn, al kiuj ili deziris plej belan estonton.

Poste ankoraŭ parolis S-ro G. Van den Bossche, nome de la Belga Esperanto-Instituto kaj, — kiel liaj antaŭuloj, — li ankaŭ transdonis donacon al la jubileanta Grupo.

Fine parolis S-ro M. Jaumotte, kiu, nome de la administrantaro unue transdonis la diplomon kaj la premion « Ant. Jennen », pro la bela kresko de la membraro de la Grupo.

Poste la prezidanto de R.B.L.E. ankaŭ entuziasme substrekis la gravecon de la laboro, farita jam en Charleroi dum la 50 pasintaj jaroj, sed ankaŭ atentigis pri la eblecoj, kiuj restas al la nunaj gvidantoj. Li gratulis la novan prezidanton kaj tutspeciale ankaŭ honorigis S-ron R. Paulus pro ĉio, kion li realigis dum tiom multe da jaroj.

Post transdono de la donaco de R.B.L.E., oni povis vidi kune sur la estrara tablo : sonorilon, flageton, oran libron, libron por agrabligi la kunsidojn kaj « atomion », kiu daŭre memoros, ke la jubileo estis solene festata en tiu glora jaro 1958a.

Akcepto en la Urbdomo.

La partoprenintoj en la festoj tiam direktis siajn paŝojn al la bela Urbdomo, kie ili estos akceptataj je la tagmeza horo.

S-ro Ligot, skabeno de Publika Instruado, ĉirkaŭata de diversaj komunumaj konsilantoj, akceptis nin kore. Li memorigis pri sia simpatio al Esperanto, pri kiu lingvo li multe scias, kvankam li ĝin neniam funde povis lerni. Li diris sian

simpation al la Karloreĝa Grupo, kiu baldaŭ disponos pri klaso por la kursoj, kaj deziris al ĉiuj kaj al nia movado ĝenerale plej grandan sukceson. Li jam promesis reakcepti nin okaze de la 50jara jubileo.

S-ro M. Jaumotte, antaŭ ol danki la Urbestraron, petis la permeson traduki resume la paroladon de la Skabeno kaj tion faris laŭ sia kutima fajra maniero, kiu forte impresis la oficialajn aŭskultantojn.

Li tiam dankis pro la kora akcepto, sed jam atentigis la Urbestraron, ke ni ne intencas atendi dek jarojn antaŭ ol ni revenos en Charleroi, ĉar ni pripensas jam tie Kongresi proksiman jaron... Kaj la skabeno tuj promesis nin ree akcepti !

La ĉampanvino tiam abunde estis enverŝata en la glasojn kaj ĉiu trinkis je la bonfarto de la Karloreĝa Grupo Esperantista.

La Festeno.

Kaj gaje ĉiuj reiris al la festsalono, kie la tabloj estis aranĝitaj por bonega menuo : pariza supkremo ; Rivera Truto, Brusela Kokido, Pastofolia Kuko kun ĉerizoj, kaj Kafo.

Je la momento de la toastoj, S-ro Jaumotte ankoraŭfoje gratulis ĉiujn, sed volis speciale honorigi S-inon Paulus, kiu, — flanke de sia edzo, — daŭre sin dediĉas ankaŭ al nia movado. Li transdonis al ŝi, nome de R.B.L.E., belajn florojn. Kaj tion faris ankaŭ post li ; S-roj Verstraeten, Poupeye kaj Jacobs, nome de siaj respektivaj grupoj.

Kaj en plej agrabla atmosfero finiĝis tiu ĉi manĝa parto de la programo.

Kabareta Posttagmezo.

La Antverpenanoj estis kunportintaj la filmon, kunmetitan en Germanujo kaj kiu tute temas pri la Kongresoj de Kopenhago kaj Marseille. Kaj tuj post la festeno S-ro P. Piron, el Namur, projekciis ĝin, dum S-ro Jaumotte plej humorplene ĝin komentariis.

Poste, eksterprograme la artisto de la Teatro de la Monnaie, Bruselo, S-ro Jean Benoit Pestiaux bonvolis kanti kelkajn ariojn, inter kiuj unu en Esperanto kaj li akiris varman sukceson, kiel cetere ankaŭ S-ino Pestiaux, kiu lin piane akompanis.

La kabareta sekcio de « La Verda Stelo », helpata de la sekretariino de la Brusela Grupo ; F-ino R. Huysmans, — kiu bonvolis anstataŭi F-inon M. Dehertoghe, malhelpatan pro malsano iom grava de ŝia fianĉo, nia bona amiko A. Duchesne, — poste prezentis tutan kabaretan programon, kiu vere, dum pli ol du horoj, plaĉe kaj amuze okupis la ĉeestintojn.

Ni ne povas detale pritrakti tiun programon.

Ni tamen diru, ke la programo enhavis belajn kantnumerojn de S-ro L. Van Bulck, akompanata de S-ro A. Peper, kiu, en kvarman-numero kun sia fratino Nelly, ankaŭ akiris sukceson, dum estis prezentataj monologoj kaj skeĉoj de F-inoj Cl. Peeters, R. Huysmans, M. Cools, R. Gerardts kaj S-ino Blik kaj de S-roj Fr. Schellekens, J. Borg ys, P. Flament kaj L. Van Bulck. La tuto estis plej agrable prezentata de S-ro Luc De Marré, dum S-ro J. Verstraeten reĝisoris kaj pro tio ankaŭ, kiel ĉiuj partoprenintoj meritis ĉies laŭdojn. Tion ankaŭ meritis la verkintoj de la skeĉoj F-ino E. Van der Weken, S-roj L. De Marré, L. Van Bulck kaj J. Verstraeten.

Tion cetere speciale substrekis, ĉe la fino, la prezidanto de R.B.L.E.

Kaj vigla dancado estis la konkludo de tiu ĉi brile sukcesinta tago.

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16
ANTVERPENO

★ Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo « La Verda Stelo »

(Poŝtĉeknumero : 726.54)

En la antaŭa numero forfalis nomo en la listo de la diplomitoj, Menciu ni ke ankaŭ S-ino C. Blik akiris la elementan diplomon kun 60 procento de la poentoj.

La 28an de februaro anstataŭ la parolado de S-ro W. Deroisy (malhelpata pro transloĝiĝo al Parizo) la Prezidanto S-ro Maur. Jaumotte ĉerpis el la « malnova skatolo » kaj skizis la historion de la grupo. La multnombraj lumbildoj, kiujn li montris multe interesis la novulojn kaj vekis agrablajn rememorojn ĉe la malnovaj membroj.

La 7an de marto, okazis la parolata ĵurnalo laŭ la malnova maniero kaj la 14an S-ro Roger Jaumotte denove organizis amuzan vesperon, kiu same plaĉis kiel la antaŭaj. Li havis multan sukceson kaj la ĉeestantoj hejmen iris kun tre agrablaj impresoj.

La 21an, S-ro H. Sielens, direktoro de la Internacia Marista Domo en Antverpeno, faris tre belan paroladon pri « Tri jaroj en la Marista Domo » kaj prezentis amason da lumbildoj, kiuj pli ol vortoj donis ideon pri la evoluo de organizaĵo tiel favora kaj socie utila al maristoj.

La 28an, denove post longa tempo, Kabareta Vespero estis organizata kiu plene sukcesis. Multaj novuloj kunlaboris kaj skeĉoj, deklamaĵoj, monologoj kaj muzikaĵoj alternis. Fraŭlo Eddy Bogaerts, juna gasto, mirinde ludis harmonikon kaj tutspeciale vekis la laŭdojn de la Prezidando F-ino Yv. Cools, H. De Coene kaj S-ro M. Van Brabant deklamis tre spritajn poeziaĵojn. S-ro J. Borghijs verkis du skeĉojn kaj en ili ludis la ĉefrolojn. Liaj kunludantoj estis : F-inoj Yv. Cools kaj R. Gerardts kaj S-ro P. Flament. S-ro L. Van Bulck verkis spritan skeĉon kaj F-ino M. Dehertoghe kun S-ro F. Schellekens akiris varman aplaŭdon en skeĉo de J. Verstraeten. S-ro F. Aertssens plenigis la rolon de la Paroladisto. S-ro A. Van Dessel prizorgis la lumon kaj S-ro F. Schellekens la dekorojn. La Prezidanto tutkore dankis por la laboro efektivigita.

Dum la Sankta Vendredo, la 4an de aprilo, S-ro Luc De Marré enkondukis la vesperon per paroladeto pri la paskaj kutimoj en la diversaj landoj de la mondo. S-ino L. Bernaerts, helpata de F-ino E. Van der Weken, organizis, laŭ iu nova sistemo, la tombolojn por kiuj la membroj kunportiŝ donacojn, kiujn oni forlotis en tre gaja atmosfero.

Ia 11an anstataŭ parolado de S-ro A. Duchesne, malsana, S-ro Maur. Jaumotte faris nepreparitan paroladon kaj montris lumbildojn pri la « Expo 58 ». La mil kaj unu sciindajoj, kiujn la Prezidanto pritraktis forte interesis la ĉeestantojn, el kiuj multaj prenis notojn. La lumbildoj pri antaŭaj mondekspozicioj refreŝigis la memoron de la malnovaj membroj kaj vigle interesis la novulojn. S-ro J. Verstraeten varme dankis la paroladinton.

La 18an, la programo menciis « Tra La Mondo », novan temon por kunsido regule revenontan, sed ĉiufoje pri alia regiono. Tiun ĉi fojon temis pri la « Rejno » kaj diversaj gemembroj alportis kontribuon, iuj per bildoj, montrotaj sur la ekrano, aliaj per la memorigo de legendoj, aŭ per klarigoj pri la ekonomia vivo laŭlonge de la Rejno kaj fine ankaŭ per poezioj, kiuj rilatas al la Rejno kaj prikantas ĝin. Partoprenis F-inoj Bl. Geers, M. Hofkens, H. De Coene, S-ino L. Bernaerts, S-roj L. De Marré, J. Verstraeten kaj M. Jaumotte, kiu konklude ĉiujn varme dankis.

La 25an, okazis E.K.I.-vespero, dum kiu estis montrata la filmo, verkita de germanaj samideanoj pri la Universala Kongreso 1957 en Marseille. Ankaŭ parolis Nederlanda samideano, prezidanto de F.L.E.

La sukceso de la tuta vespero estis vere granda, same por la paroladisto, kiel por la bela filmo. Kaj S-ro Jaumotte, prezidanto de E.K.I. tion substrekis.

FAMILIA VIVO

Gefianĉiĝo

Ni tutkore gratulas, pro ilia oficiala gefianĉiĝo, niajn fidelajn membrojn F-inon Mariette Cools kaj S-ron Luc

KONFITEJO "LA CIKONIO"
G. DENDOOVEN-DERIJCKE
LANGESTRAAT, 52, BRUGGE - TEL. 342.78
specialaĵo de bapto-sukero
luksaj kaj ordinaraj skatoloj

De Marré, kiuj cetere baldaŭ, jam la 19an de julio, geedziĝos.

Edziniĝo

Niaj samc koraj gratuloj ankaŭ iras al nia afabla membrino Maryse Van den Bossche, filino de nia amiko S-ro G. Van den Bossche, direktoro de nia Instituto, kaj kiu edziniĝis kun S-ro Mannaerts.

Naskiĝo

Gratulojn ankaŭ al G-roj H. Vermuyten-Lacroix pro naskiĝo de ilia nepineto Johanna, ĉe iliaj gefiloj Hugo Vermuyten-Fremau.

Programo de la venontaj kunsidoj

Ĉiuvendrede en « Witte Leeuw », Frankrijklei, 4 je la 20,15a h. (Ia etaĝo)

MAJO : La 2an : Raportoj pri la jubileaj festoj en Charleroi ; la 9an : parolado de S-ro Maur. Jaumotte pri « Vizito al la Ekspozicio 1958 » ; la 16an : Parolata Jurnalo ; la 23an : Distra Vespero (S-ro Roger Jaumotte) ; la 30an : Kabareta Vespero.

JUNIO : La 6an : Vizito al la Antverpena Kermeso ; la 13an : Parolado kun lumbildoj de S-ro Leos Horsky, angla samideano, pri « Rembrandt » ; la 20an : « Tra la Mondo », 2a serio : « Francujo » ; la 27an : Diplomdisdono al la lernintoj de la simpla kaj perfektiga kursoj.

BRUGO

Bruĝa Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero : 4835.33)

La unua horo de ĉiu kunveno estis dediĉata al daŭrigo de la perfektiga kurso. Dum la dua horo diversaj okupajoj celis praktikan uzon de la lingvo.

Pri la balo de la 15a de februaro estis detale raportata dum la kunveno de la 18a.

Dum la kunveno de la 25-a, F-ino L. Vermeersch interese priparolis pri « Bankbiletoj ».

Portretludado kaj interparolado agrabligis la kunvenojn de la 4a, 11a kaj 18a de marto.

La 25an de marto okazis lasta kunveno en la sidejo « Cornet d'Or », kiu, kiel ĉiujare, ne plu estas disponebla post Pasko. F-ino Y. Poupeye paroladis pri « Giuseppe Verdi », lia vivo kaj liaj verkoj kaj speciale pri la opero Rigoletto, el kiu diversaj kantoj estis disaŭdigataj per la diskaŭdigilo.

Speciala festeto okazis jaŭdon 27an de marto en la « Gilde der Ambachten », kie nia grupo, laŭ invito de la grupo « Paco kaj Justeco », estis regalata per kukaĵoj kun kafo kaj aliaj dolĉaĵoj. Post tio, S-ino H. Roose-De Keersgieter gvidis interesan konkurson « Cerbogimnastiko ». S-ro Ch. Poupeye, prezidanto de nia grupo, dankante la alian grupon kaj ĝian prezidanton S-ron F. Roose, pro tiu afabla regalaro, ĝojis pro tiu plia kunlaborado laŭ la spirito de la E.K.I.

La 1an de aprilo, la grupo kunvenis, unuafoje, en nova somera kunvencjo : la hotelo « Wellington », sur la placo « 't Zand ».

La prezidanto klarigis ke pro neantaŭviditaj malfacilaĵoj ni, tiun ĉi jaron, ne povas okupi la ejon « Concordia », kie ni kunvenis dum la du antaŭaj someroj. Post la kutima leciono, humorajoj estis rakontataj precipe de S-ro R. De Buysere.

Ankaŭ la 8an de aprilo, la kunveno okazis tie kaj precipe priparolis la partoprenon al la jubileaj festoj de la grupo de Charleroi.

En la sekcio de St-Michiels la tre interesa perfektiga kurso sub gvidado de S-ro R. Behaeghel, estis daŭrigata ĉiulunde kaj atente sekvata de kelkaj fidelaj gemembroj.

Kondolencoj

Al S-ro Dentisto kaj al S-ino Etienne De Craeke-Cardinael, Honora Prezidanto de la Bruĝa EKI kaj ambaŭ gemembroj de la Bruĝa Grupo, pro la morto de ilia bopatro kaj patro : S-ro Joseph Cardinael (11-4-58).

Programo de la venontaj kunsidoj

1-e) ĉiulunde, je la 8a vespere, en la komunuma lernejo de Sint-Michiels, leciono de la perfektiga kurso sub gvidado de S-ro R. Behaeghel. Ĉiuj grupanoj estas invitataj kaj estos bonvenintaj. Tiu kurso finiĝos verŝajne la 2an de junio. Ek de la 9a de junio, la sekcio kunvenos ĉiulunde en la sama lernejo, por praktika aplikado de la lingvo, ĝis la somera libertempo.

2-e) ĉiumarde, je la 8a vespere, en la hotelo « Wellington », placo « 't Zand » N° 18, (Tel. 316.33), salono je la 1-a etaĝo laŭ la hotela enirejo :

a) dum la unua horo : leciono de la perfektiga kurso ;

b) dum la dua horo : diversaj aktivaĵoj laŭ jena programo :

MAJO : 6-an : Raportado pri la kermesa foiro ; 13-an : Humorajoj ; 20-an : Legado de B.E. ; 27an : Parolado de S-ro R. Lagast pri « Esperanto kaj Junularo ».

JUNIO : 3-an : Muzika vespero kun komentario de F-ino Y. Poupeye ; 10-an : Parolata gazeto ; 17-an : Konkursludoj sub gvidado de S-ro R. Behaeghel ; 24-an : « Polaj Rozoj », poezioj prezentotaj de S-ro R. Lagast.

JULIO : 1an : Libertempaj proponoj ; 8-an : Vizito de pentraĵa muzeo, lumigataj Primitivoj, sub gvidado de S-ino S. Verbeke ; 15an : Konkursludoj sub gvidado de S-ro R. Behaeghel ; 22-an : Parolata gazeto ; 29-an : Impresoj pri la Brusela Ekspozicio.

BRUSELO

Reĝa Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉeknumer : 12.30.48)

Dum la vespero de la 24a de februaro estis komunikata la rezulto de la testoj por bonvolemaj interpretistoj dum la Expo 58, por kiu sin prezentis, la unuan tagon, 13 kaj, la duan tagon, 26 samideanoj, apartenantaj al la diversaj grupoj. S-ro D. van der Stempel daŭrigis sian perfektigan kurson, nome pri apozicioj, transitivaj kaj ne-transitivaj verboj.

La 3an de marto, okazis parolata ĵurnalo al kiu partoprenis multaj gemembroj, el kiuj akiris la plej multajn poentojn ; por la verkita teksto, S-ro M. Nanquette kaj por la elektita : F-ino R. Huysmans.

La 10an, okazis sub la prezido de F-ino Huysmans, kiu anstataŭis la prezidanton, parolado de S-ro Felix Swinne, pri « Einstein kaj Liberekonomio », pri kiu temo estis donataj plej interesaj detaloj kaj pri kiu ankaŭ ekestis vigla diskuto.

LES ENTREPRISES
DERKS
226, Rogierstrato, BRUSELO
Tel. : 15.19.92
Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

La 17an sekvis plia perfektiga leciono de S-ro D. van der Stempel, kiu speciale instruis esprimojn utilajn por la konversacio kun turistoj.

La 24an de marto, S-ro L. Baudour amuzis la ĉeestantojn per diversaj gajaj komunaj ludoj kaj la 31an, S-ro D. van der Stempel enkondukis kiel temon por diskuto : « La Sud-poluso ».

Pro la paskaj festoj ne okazis kunveno la 7an de aprilo kaj la 14an sekvis perfektiga kurso de S-ro D. van der Stempel.

La 21an S-ino R. Lecat faris tre interesan paroladon kun lumbildoj pri « Cambridge kaj ĝiaj kolegioj », pri kies speciala atmosfero ŝi donis vere surprizajn detalojn. La prezidanto kore dankis la paroladistinon kaj ankaŭ S-ron P. Piron, kiu el Namur alportis la projekci-aparaton.

La 18an, raporto estis farata pri la jubileaj festoj en Charleroi kaj la 5an de majo, sekvis la kutima parolata jurnalo.

Programo de la venontaj kunsidoj

ĉiulunde, je la 20a h., en « Brasserie de la Justice », 38, place du Grand Sablon, Bruselo Ia, Tel : 12.64.76.

MAJO : la 19an : Perfektiga kurso de S-ro van der Stempel ; la 26an : Pentekosta lundo (ne okazos kunveno).

JUNIO : la 2an : parolata jurnalo ; la 9an : Parolado de Londona Samideano, S-ro Leos Horsky, pri « Rembrandt, lia vivo kaj verko », kun kolorlumbildoj ; la 16an : Perfektiga kurso de S-ro van der Stempel ; la 23an : je la 19a t ; Ekzameno de la gekursanoj ; je la 20a h : Amuza vespero, gvidota de S-ro Baudour ; la 30an : Diplomdisdono al la gelernintoj

de la elementa kurso ; **Kabareta Vespero organizita** de F-ino R. Huysmans, **kun la kunlaboro de la Antverpeno sekcio kabareta**, kiu speciale veturos Bruselen.

JULIO : la 7an : Parolata jurnalo ; la 14an : Tradukvespero ; la 21an : Komuna Legado ; la 28an : Amuza vespero.

AŬGUSTO : la 4an : Parolata jurnalo ; la 9an, 10an kaj 11an : partopreno al la akcepto de la karavano de postkongresanoj, venontaj el Mainz, por viziti la Ekspozicion ; la 18an : Komuna legado ; la 25an : Amuza vespero.

VERVIERS

Esperantista Grupo Verviers

La lasta « Trilanda Renkontiĝo » okazinta en Aaken dum decembro lasta komisiis la Verviersan Grupon organizi la proksimajn ceremoniojn okaze de la Zamenhofa festo. Ĉar la Grupo fondiĝis dum 1908a, ĝi decidis organizi samtempe sian Oran Jubileon.

La komitato jam planis la grandajn liniojn de la programo, kiu enhavos inter aliaj : publikan kunvenon kulturan kaj muzikan, sabaton 13an de decembro 1958 vespere ; akademian kunvenon kaj akcepton ĉe la urbodomo la morgaŭan, kaj publikan ekspozicion en iu salono en la centro de la urbo. Por helpi al la sukceso de ĉio, la Grupo varbis Honoran Prezidanton en la persono de Sinjoro Senatano Hubert Vandermeulen, kiu danke akceptis kaj promesis helpi laŭ sia tuta povo.

Pliaj detaloj estos komunikataj pli poste, sed, jam de nun, la jubileonta Grupo etendas inviton al ĉiuj belgaj sekcioj, kaj petas iliajn membrojn jam rezervi tiun daton por partopreno.

ANONCETOJ

● **Esperantistajn-Grotpriserĉistojn** mi serĉas, por kune enirigi esperanton en speleologiaj medioj. — Jules Borghijs, J. Wautersstr., 113, Willebroek.

● **Verda Stelo, Klubo Esperantista :** Sztalin út 9 Irodaház Györ Hungario, deziras trovi belgajn korespondantojn.

● **Bulgara filmamatoro** deziras korespondadon kun belgaj filmamatoroj pri mallarĝa filmo (8 mm.) — Karl Niemetz, Str. « Neofit Rilski » 54 a, Sofia - Bulgario.

Bibliografio

G. P. De Bruin : « Historia Skizo de la Internacilingva Ideo » eldonis la « Asocio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la Nederlanda lingvo » F.L.E. Amsterdam. sen dato. Broŝuro 40 paĝa. Prezo 1,50 Nederlandaj guldenoj.

La antaŭ ne longe mortinta samideano G. P. De Bruin estis historiisto kaj eminenta esperantisto. Tiu-ĉi broŝuro enhavas la artikolojn kiujn li publikigis pri la supre nomita temo en la studgazeto « La Progresanto ». Kun konvinko ni bonvenigas tiun-ĉi eldonon. Ĝi plenumas nepran bezonon. Efektive, se oni ne povas postuli ke ĉiuj esperantistoj studu funde la jam longan kaj ampleksan historion de la internacia lingvo (cetere la scienca verko de L. Léau kaj L. Couturat « Histoire de la Langue Universelle » éd. Hachette Paris, ne plu estas en la komerco kaj malfacile trovebla) oni tamen rajtas postuli, ke ili sciu ke Esperanto ne estas la sola internacia lingvo; ke famaj filozofoj (ekz. Descartes kaj Leibnitz) kaj pedagogoj (ekz. Komensky) jam antaŭ jarcentoj pensis kaj skribis pri tiu problemo; eĉ skizis projektojn. Ĉion tion vi trovos, konciza, en tiu broŝuro; ĉio antaŭ, kaj ĉio post Esperanto. Por malmulte da mono, en mallonga tempo, vi akiros ampleksan scion. Aĉetu kaj legu !

Drs. F. R.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE S.P.R.L. Tel n-roj 223.01 - 225 37

Du esperantaj markoj :

TABULO, por lernejtabuloj ; KATOKULO, por signalvitroj.

LISTO LE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

Presejo „Espero", Dianalaan 180, Berchem.
W. Van Nereaux-Amerykx, Overdekte Markt, 22-24, Van Wesenbekestr. — Viandisto.
Hugo Jacques, Lange Beeldekensstraat, 25. Presajoj Tel. 33.75.38
„Schoenen BED" (S-ino E. Bed), Lge. Gasthuisstr. 6. Ŝuoj Tel. 32.62.86
G. Faes, Schoenmarkt, 16. Ĉiuj muzikajoj, instrumentoj, radio kaj gramofono Tel. 32.67.21
Roger Jaumotte, Cyriel Buyssestr. 44, Anoncoj en tagjurnaloj. Tel. 37.47.14
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
R. De Soete-Vanistendael, Dambruggestraat 234, Okulvitroj — Rab. 5 %
CL. Peeters. Onderwijsstraat 68. Apotekejo Tel. 35.40.67
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken Vitrajoj — Speguloj. Tel. 37.88.20
J. Van Nereaux, Sterstraat 1. Viandisto Tel. 39.55.81
H. Peeters, Vordensteistr. 58, Schoten. Inĝen. : Neonlumo, Reklamoj. Tel. 81.48.47
Verdijck, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34. Fumajoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
A. van den Neste, Deurnebaan 30, Merksem. Presad-inkoj. Tel. 45.78.59
„In 't Duifken" (S-ano Paesmans), Lge Koepoortstr. 64 : Kostumoj (5 % rab.)
Vino Max Bolsius, Diepestr. 58-60 : Kuirejilaro. Tel. 32.57.85
M. Philips, K., Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj — Rab. 5-10 % p.l. membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg Ŝuoj — Teksajoj — Mercerajoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arĥitekto. Tel. 39.58.66
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25. Privataj lecionoj pri lingvoj, ankaŭ pri Esperanto. Tel. 39.17.09
S-ino Henny Jacques-de Ketelaere, Lange Beeldekensstr. 31. Gramofonaj diskoj por meminstruado. Tel. 33.75.38
J. Van Hoof, Marialei 7. Pentraj-entrepenoj Tel. 39.35.33

Bruĝo

Marcel Poupeye, Elf Julistr. 32. Ĉiaj asekuroj en la tuta lando Tel. 371.93
Charcuterie Strovi, Vlamingstraat 38 (Teatroplaco). Viandvaroj. Tel. 334.08
Maison Joye, Geldmuntstraat 29. Ĉemizoj, Gantoj, Kravatoj. Tel. 332.75
Firmo G. Verbeke, Spinolarei 19 : Konstrumaterialoj. Speciale naturŝtono de Jura. Tel. 321.85
Pan- kaj Kukbakisto R. Rosseel, Mariastraat 30. Konsumsalono. Tel. 338.34

Bruselo

M. Jirousek, 104 rue du Téléphone; reklamoj kaj litertipoj Tel. 18.77.67
Farmaciisto Jacobs, 94 rue général Eenens Bruxelles 3. Tel. 15.26.01
„Bonbons Swinne", 77 rue de Nieuwenhove. Tel. 44.57.36
Carrelages „Carrat", 19 avenue de Saxe. Tel. 21.74.49
KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamoj en siaj butikoj
G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Frizitoj por sinjoroj. Tel. 39.22.81
„De Boerinnekens" (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo.
A. Roels, Montignystraat 155. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07
Librejo Schuttershof, Schuttershofstr. 36 : luo, aĉeto. vendo de libroj.
Vojaĝ-agentejo Pier Busseti, Frankijklei 32 : privataj kaj grupvojaĝoj.

Drukk. DE BAENE, Delaplacestr., 3, St.-Kruis

VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ
" MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54

Reprezentanto en Nederlando :

J. C. den hartog, kostverlorenstraat, 91

zandvoort, tel. k 2507/2008